

Francis M. Hult

INTERLIGOJ, MULTLINGVISMO KAJ LA CELOJ POR DAŬRIPOVA EVOLUIGO

Multlingvismo, kerna valoro de Unuiĝintaj Nacioj, formas ofte forgesitan sed esencan elementon, kiu kunligas ĉiujn Celojn por Daŭripova Evoluigo (CDE). Verdire, fundamenta principo de homeco estas tio, ke ĉiu sperto estas perata de lingvoj, inkluzive evoluigon de novaj solvoj al la defioj emfazataj de la Celoj por Daŭripova Evoluigo. En sia raporto *Loud and Clear: Effective Language of Instruction Policies for Learning* (Laŭte kaj Klare: Efikaj Instrulingvaj Politiko por la Lernado), la Monda Banko notas ligan inter lingvo kaj malriĉo, Nome: “akumulado de homa kapitalo estas plejparte lingve bazita agado.” Indiĝenaj popoloj plue suferas malriĉecon eksterproporcie. Lingva diskriminacio, precipe de indiĝenaj popoloj kaj minoritatoj, malhelpas konstruon de la lingvaj rimedoj bezonataj por superi kondiĉojn de malriĉeco kiam tiuj kiuj suferas diskriminacion ne povas aliri klerigajn kaj dungajn rimedojn haveblajn sole aŭ ĉefe per dominaj aŭ regionaj lingvoj. Tiusence, **CDE 1** kaj **CDE 16** estas intime kunligitaj, ĉar kreado de inkluzivaj socioj por certigi, ke neniu postrestas rilate sociajn kaj ekonomiajn servojn, devas enteniprotekton de la lingvaj rajtoj garantiataj en homrajtaj instrumentoj kiel ekzemple la *Deklaracio de la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj* kaj la *Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj*.

Plue, konsiderado de tiu ĉi rilato prezentas okazon por konsideri kiel oni povas utiligi la Jardekon pri Indiĝenaj Lingvoj (2022-2033) por progresigi la lingvajn rajtojn entenatajn en la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, tiel ke tiuj rajtoj estu utiligataj cele al fortigo de lingva kapablokonstruado por redukti malriĉecon ene de indiĝenaj komunumoj, certigante, ke institucioj je ĉiuj niveloj plene inkluzivu indiĝenajn popolojn.

La dominado de malgranda nombro de naciaj kaj regionaj lingvoj en landoj tra la mondo daŭre konsistigas signifan defion al inkluzivado. Protektado de multlingva inkluzivado postulas “partnerecojn kiuj inkluzivas multajn concernatojn kaj mobilizas kaj dissemas sciojn, ekspertizojn, teknologion kaj financajn rimedojn” kaj “efikajn publikajn, publikajn/privatajn, kaj civilsociajn partnerecojn,” kiel celate en **CDE 17**. Kiel atentigas la Departemento de UN pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj en sia *Engaĝiĝo de Koncernatoj Rilate la Tagordon 2030: Praktika Gvidilo*, necesos fokusigi la plenan spektron de homa novigokapablo al rea survoĵigo de la CDE-oj – kaj tio postulos aŭdebligi kaj komprenebligi ĉiujn voĉojn, farante informojn multlingve alireblaj, reduktante lingvajn barilojn al partopreno, fortigante konscion pri la CDE en lokaj lingvoj, kaj ĝenerale engaĝante ĉiujn homojn ĉiuloke – pere de ties propraj lingvoj. Civilsociaj organizoj estas nemalhaveblaj partneroj por kunligi larĝan spektron de lingve kaj kulture diversaj perspektivoj kaj sciofundamentoj por ree surreligi la Celojn direkte al “efike liveri daŭrigeblajn, fortikajn kaj novigajn solvojn.”

Majo 2024